# EKO 2025

**Honorigo por hungarino**

EKO 2025-33, Aŭgusto 12  Pezo: Word 40, PDF 500 KB, Alkroĉaĵo Sume ? KB

## Aŭgustaj aŭguroj onde kaj tutmonde

Antaŭ 120 jaroj, la 1-an de aŭgusto 1905, naskiĝis Hugo Röllinger (1905-2001), germana asekuristo kaj esperantisto, komisiito de UEA (1965-2001) pri listo de stratoj, placoj, parkoj kaj aliaj Zamenhof/Esperanto-objektoj (ZEOj), kiu en 1997 aperis libroforme kiel "Monumente pri Esperanto". Legu la liston de Esperantaj jubileoj kaj memordatoj por aŭgusto 2025, kompilitan de Aleksander Korĵenkov, en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto*  https://sezonoj.ru/2025/08/augusto-4/

## La hungarino Monika Molnár honorita

La **Premio Onisaburo Deguĉi**  de UEA estas anoncita, ĝi  distingas la plej meritajn projektojn kaj agantojn (individuojn aŭ organizaĵojn), kiuj aktivas sur la kampo de utiligo de Esperanto kiel potenca rimedo por monda paco kaj homara feliĉo, konforme al la idearo de L. L. Zamenhof, la instruoj de Deguĉi Onisaburo kaj la Statuto de UEA. La premio honoris la japanon Deguĉi Onisaburo, kunfondinton de la Oomoto-movado, kiu en 1923 enkondukis en sian agadon Esperanton kiel internacian komunikilon por la disvastigo de la ideoj pri universala homamo kaj monda paco. La premio honoras tiujn, kiuj pleje kontribuas al la realigo de la bazaj celoj de UEA.

Mónika Molnár naskiĝis en 1975 en Hungario kaj loĝas ekde 2003 en Svislando. Diplomita instruisto pri informadiko, italaj lingvo kaj literaturo, kino, esperantologio kaj interlingvistiko. De jaroj ŝi laboras en lernejo *La Granda Ursino* en Ŝodefono (www.grande-ourse.ch), kie ŝi instruas matematikon, sciencojn, manlaborojn kaj Esperanton al 6-15-jaraj gelernantoj.



Ŝi eklernis Esperanton en 1993 kaj ekde tiam okupiĝas pri la lingvo. Ŝi membras en ILEI, UEA, HEJ (Hungara Eo-Junularo), SES (Svisa Esperanto-Societo), IRE (Internacia Rajtigita Ekzamenantaro) /2005/, IEK (Internacia Ekzamena Komisiono) /2007/ kaj estas rajtigita ekzamenanto laŭ la KER-sistemo /2009/.

Ŝi plenumis arkiv-laborojn en la biblioteko de CDELI en Ŝodefono kaj kunlaboris kaj ilustris la librojn "Okulo" kaj "Okulo-Gvidilo" (Eo-lernolibro por infanoj kaj gvidlibro por instruistoj, aŭtorita de Stefan MacGill. kunlaboras (ilustrado, rubrik-redaktado) en *Juna Amiko,*  organizis esperantajn lingvokursojn, kunlaboras ĉe edukado.net (paĝaro por

Esperanto-instruistoj, kursorganizantoj kaj memlernantoj), kune kun ekzamena aktivado. En decembro 2012 Mónika eniris la panteonon de la retejo edukado.net. Fonto de la informoj:
https://edukado.net/biblioteko/panteono?iid=111&s=1e5f2fd4afe83c3cfc2c7764b3c0c98d

Ŝia laboro por edukado de infanoj cele al mondcivitaneco per Esperanto plene meritigas ŝin por la Premio Deguĉi 2025. UEA gratulas al Mónika kaj dankas ŝin pro tiu laboro.

## Elstara agado agnoskita en Brno

En la Fermo de la UK en Brno estis anoncita la disdono de ses diplomoj pri Elstara Agado kaj unu pri Elstara Arta Agado por la jaro 2025. La Diplomoj pri Elstara kaj Elstara Arta Agadoj estas aljuĝataj de la Estraro de UEA ekde la jaro 2007 (https://eo.wikipedia.org/wiki/Diplomo_pri_Elstara_Agado).

**Elstara Agado**

***Nisinaga Atusi "Acero"*** (Japanio) pro elstara agado kiel kunordiganto de la Komisiono de UEA pri la Azia-Oceania Movado (KAOEM), interalie pro efika subteno al la okazigo de la 10-a Azia-Oceania Kongreso (AOK), kaj pro la longtempa agado por Esperanto en Japanio, interalie kiel vicprezidanto de Japana Eo-Instituto.

***Henriel Fidilalao*** (Madagaskaro) pro la aktiva laboro pri disvastigo de Esperanto en Madagaskaro, interalie per prizorgado de la reta "Aminda Radio Esperanto", kiu elsendiĝis jam 153-foje, kaj la monata revuo "Panoramo de la Granda Insulo".

***John (Xiaolong) Huang*** (Kanado) pro la elstara aktivado kadre de Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio (IKEF), kiel prezidanto de IKEF Nordameriko, ĉefredaktoro de la revuo "La Merkato", organizanto de ĉiu-dimanĉa reta kunveno. Krome li estas oficiala fotisto de UK ekde 2022.

***Françoise "Fransoazo" Noireau*** (Francio) pro la elstara agado pri instruado de Esperanto en Afriko per la reto (Vacapo) kaj kunordigo de 16 instruistoj, plimulte afrikaj, kadre de kunlaboro kun la Universitato Espero en Barako, Kongo DR

***Libuše Dvořáková*** (Ĉeĥio) pro longjara prizorgado de la Esperanto-muzeo en Svitavy.

***Věra Barandovská-Frank*** (Germanio/Ĉeĥio), ĉi-jara rektoro de la Internacia Kongresa Universitato (IKU), pro la multjara lingvistika agado kunlabore kun la edzo Helmar Frank pri Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), longtempa instruado en Poznano kaj verkado de ĉ. 130 sciencaj publikaĵoj.

**Elstara Arta Agado**

Bobelarto (Hungario/Kanado) pro la elstara kontribuo al la literatura agado en Esperanto, interalie per organizado de Internacia Novel-Konkurso (INK), literatura duonmaratono, verksesioj kaj legosalonoj.

## Konga stelo brilas forte en la firmamento

Nia informilo, ***Konga Stelo*** entenas svahilajn salutojn. La Esperanto-movado en Kongo-Kinŝaso havas plurjaran ekziston, sed esperantistoj laboras unuope aŭ grupe en fermitaj kluboj aŭ asocioj, nesciante pri kluboj en aliaj landpartoj. Do, DKEJO kaj ILEI opiniis, ke eldono de informilo estos paŝo progresen en la tutlanda Eo-movado, ĉar ĝi

provizos ĉiam informojn pri la evoluo de nia movado tra la lando kaj fervorigos kongolandanojn plu aktivi kaj rilatiĝi kun samlandanoj. *Konga Stelo* enhavos novaĵojn pri ĉiuj poresperantaj aktivaĵoj, kaj do ni kunlaboros kun ĉiuj e-asocioj kaj kluboj de Kongo por riĉiĝi kaj pluvivigi nian trimonatan revuon. Jen la ligilo al ĝi:

https://uea.org/vikio/Dosiero:KONGA_STELO_REVUO.pdf.

## Inter la karstoj

Karstaj tagoj, Esperanto-renkontiĝo kun longa tradicio, okazos de la 26-a ĝis la 28-a de septembro 2025 en la Karsta regiono inter Italio kaj Slovenio. Legu pli ĉe https://sezonoj.ru/2025/06/slovenujo/,

## Islamo kaj Eŭropo

Aperis artikolo en la retejo uea.facila.org, kiun prizorgas **Anna Lowenstein** kun siaj kunlaborantoj (https://uea.facila.org/kunlaborantoj/). La artikolon verkis **Jessie Cecilia** kun la titolo **Islamo kaj Eŭropo: komuna, forgesita historio**, kaj voĉlegis ĝin **Simone Schumacher**:

https://uea.facila.org/artikoloj/opinioj/islamo-kaj-e%C5%ADropo-komuna-forgesita-historio-r482/



## Britaj fervojaj atingoj por la vartransporto

La brita vartransporta kompario *GB Railfreight* montris la unuajn lokomotivojn el la tipo 99, kiujn Stadler liveras laŭ 150-mllionpunda mendo. La elektro-dizelaj **lokomotivoj kapablas trafiki hibride ĝis 120 km/h.**

## Ĉinio – la monda ĉampiono pri altrapidaj fervojoj

Ŝlosila sukceso de la Ĉina Fervojo estas la strebo malfermi ankoraŭ du mil kilometrojn da altrapidaj linioj ĉi-jare. Cele al tio estas la kompletigo de la linio Chongqing Orienta – Qianjiang kun rapideco de 350 km/hr.



## Kompilita historio pri la UK-oj

Post la 110-a Universala Kongreso vi povas legi artikolojn pri ĉiuj UK-oj okazintaj ekde la 76-a UK en Bergeno en 1991 ĝis la 109-a UK en ArUŝo en 2024, escepte de la 105-a

(Montrealo, 2020) kaj 106-a (Belfasto, 2021) UK, kiuj estis nuligitaj pro la koronvirusa pandemio. Vidu: https://sezonoj.ru/2025/07/uk-22/

## Verdaj bananoj vere buntas

En la Kongresa Kafejo, premieris la Teatro Verda Banano dum la 110-a  Universala Kongreso en Brno. kun la elstaraj aktoroj Saŝa Pilipoviĉ (RS) kaj Georgo Handzlik (PL). La venonta prezentado okazos en oktobro dum la Korea Esperanto-Kongreso.



## Belarte, bonfarte

Jen la filmo en kiu la Prezidanto de la Belartaj Konkursoj de UEA diskonigas la ĉi-jarajn rezultojn

https://youtu.be/ZQ8F4_eeaxU

## Itala pionirino

Norma Cescotti lernis Esperanton, kiam ŝi estis 70 jaraĝa (pli-malpli). Nun ŝi instruas per interreto. Dum la pandemio ŝi aperis en diversaj televidelsendoj, inkluzive de la nacia itala televido RAI, Ĉu vi sentas vin maljuna? 🙂

Jen la prelego de Russell Scott Valentino por la Simpozio de ILEI "AI kaj kulturo" (20/12/2025): “Inter la Generipova AI kaj traduka praktiko" (In-between the In-between: Generative AI and Translation Practice).

Simpozio de ILEI 2025: Russell S Valentino

Ambaŭ eroj de Alessandra Madella

========= vortoj: 1120 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj
Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**Tridek numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.